/2/ WERNER, J.: Terminologia kurso. Esperanto-Asocio. Roudnice n.L. 1983, 88 p.

/3/ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, dua eldono, Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris 1977, 1303 p.

/4/ CHERPILLOD, A.: Nepivaj vortoj, dua eldono, Eldono de aŭtoro, Courgenard, 1988, 182 p.

Adresoj de la autoroj:

Förderverein "Lexicon silvestre" e.V.
Dr. Karl-Hermann Simon
c/o Fachhochschule Eberswalde
Bibliothek
Schicklerstr. 3-5
D - 16225 Eberswalde



# Fondaĵo Premioj Por Ĝustaj Vivrimedoj

## *Right Livelihood Award Foundation*

Porgazetara informo je la 12-a de oktobro 1994

"La premioj de la Fondaĵo Por Ĝustaj Vivrimedoj en 1994 emfazas la gravecon de la infanaro, spiritaj valoroj kaj indiĝenaj kulturoj.

Premiojn ricevas sveda autorino de infanlibroj, niĝera aktivulo por homrajtoj kaj memhelpaj organizaĵoj en Hinda Unio kaj Trinidado."

**Astrid Lindgren**, sveda autorino, gajnas en 1994 la **Honoran Premion**. Ŝiaj porinfanaj libroj, tradukitaj en 60 lingvojn, estas amataj en la tuta mondo. Ili enspiris la imagon kaj edifis la spiriton jam de multaj generacioj de infanoj kaj plenkreskuloj.
En la 1980aj jaroj Astrid Lindgren komencis kampanjon kontrau misuzo de bestoj, kio kondukis al leĝo, mondvaste rigardata kiel la plej progresinta, kiu limigas fabriktipan bestobredadon.
La jurio honoras la vivdauran dediĉon de Astrid Lindgren al la rajto de infano por kresko en amo kaj en respekto al ilia individueco. La premio honoras ŝian sindevigon al justeco, senperforteco kaj komprenado de minoritatoj kaj ŝian amon kaj respondecon al naturo.

**La Premion Fondaĵo Por Ĝustaj Vivrimedoj** pri 250000 USD estas en 1994 distribuita inter la ogolanda niĝerano Ken Saro-Wiwa kaj la organizo MOSOP kies prezidanto li estas, la hinda kuracisto H. Sudarsha kaj la organizajo VGKK, kaj la trinidada organizajo SERVOL.

Internacia Scienca Asocio Esperantista

**Ken Saro-Wiwa / MOSOP** (*Movement for the Survival of the Ogoni-People*), Niĝerio, iniciatis protestojn kontrau la kruda ekspluatado de la Ogonia-Popolo kaj kontrau la poluado de ĝia medio per la senskrupula elprenado de petrolo fare de ŝtata "*joint venture*" kun *Shell, Elf-Aquitaine* kaj *Agip,* kio kauzis ekologia katastrofo. En majo 1994 soldatoj de la militista reĝimo forkaptis lin; oni timas, ke li estas malliberigita en kazerno en la Rivera Provinco, Suda Niĝerio, kaj ke lia vivo estas en granda danĝero. Pro tio Amnestio Internacia adoptis lin kiel Malliberulo de Konscienco.
La ĵurio honoras Saro-Wiwa "pro lia modela kaj sindona kuraĝo kaj lia senperforta strebado por la civilaj, ekonomiaj kaj mediaj rajtoj de lia popolo". La ĵurio alvokas la niĝeran registaron al lia senprokrasta liberigo.

**H. Sudarshan / VGKK** (*Vivekananda Girijana Karyana Kendra*), Hinda Unio, kuracisto kaj kunfondisto de la organizo, laboris kune kun la Soliga-Popolo en la Biligiri Rangana Montaro en la Karnataka Provinco dum 15 jaroj, antauenigante ĝian integran socian, kulturan kaj ekonomian bonstaton. VGKK estas modelo de sensiva kaj homcentra evoluigo.
La ĵurio honoras d-ron Sudarshan kaj VGKK "pro la elmontro, kiel triba kulturo povas kontribui al procezo, kiu havigas al indiĝena popolo ĝiajn fundamentajn rajtojn kaj bezonojn konservante ties medion, ebligante al ĝi fariĝi pli memstara kaj samtempe kontribui pli vaste al la socio."

**SERVOL** (*Service Volunteered for All*), Trinidado kaj Tobago, prizorgas infanojn antaulernaĝajn kaj adoleskantajn kaj iliajn gepatrojn; ĝi efektivigis edukan kaj evoluigan procezon, kiun adoptis la trinidada registaro, kaj kiu disvastiĝis en la kariba regiono.
La ĵurio honoras SERVOL "por elmontro de la decida graveco de spiritaj valoroj, de kunlaborado kaj de familia respondeco aldone al praktikaj lertoj kaj atingoj konstruante civilizitan socion."





La premioj estas transdonitaj kiel kutime en la SvedaParlamento je la 9-a de decembro, unu tagon antau la Tago de la Homrajtoj kaj antau la transdono de la Premioj Nobel. La Premioj *Right Livelihood Awards* estas ankau nomitaj "Alternativaj Premioj Nobel".

Tiuj ĉi premioj enkondukiĝis en 1980 "por honori kaj subteno tiujn, kiuj montras praktikajn kaj ekzemplajn respondojn al la plej urĝaj defioj, kiuj frontas nin en la hodiau mondo". La ideo venis de Jakob von Uexkull, sveda-germana filantropo, filatelia spertulo, kiu vendis sian altvaloran kolektaĵon de poŝtmarkoj kaj tiel provizis la originan fondaĵon. Li opiniis, ke la Premioj Nobel fariĝis tro limigitaj kaj specialigitaj kaj ignoras multan laboran kaj esencan scion, kiu estas vivnecesa por la pluvivado de la homaro.

Gazetara konferenco kun la premiitoj okazis en Stokholmo, je la 7-a de decembro 1994.

Pri pliaj detaloj komuniku kun:

Right Livelihood Awards Administrative Office
S-ino Kerstin Bennett
Administra Direktorino RLA
P.O.Box 15072
S-10465 Stockholm
Tel. +46(0)87020340
Fax. +46(0)87020338

Pri RLA vidu ankau: Sci. Rev. Vol. 44 (1993)(1)-162 p.40-44.